

Esperanto - La Bitbulteno 88

esperanto.es

TEMPORADA ALTA DE ENCUENTROS Y CONGRESOS DE ESPERANTO

Con la llegada de la estación veraniega (en el hemisferio norte) aumenta el número de encuentros internacionales de hablantes de la lengua internacional esperanto. Encuentros de todo tipo, desde los congresos de asociaciones internacionales, a los festivales culturales o los cursos intensivos.

El encuentro más destacado será el Congreso Universal de Esperanto, que este año tendrá lugar en Turín (Italia), del 29 de julio al 5 de agosto. Se espera una amplia asistencia, tras las perturbaciones ocasionadas estos últimos años por la pandemia. Se pueden encontrar todas las informaciones, incluyendo la manera de inscribirse, en la web del [comité organizador](#) y en la de la [Asociación Universal de Esperanto](#).

El [79º Congreso Juvenil Internacional de Esperanto](#) tendrá lugar en Lignano Sabbiadoro, ciudad turística, junto al mar, también en Italia, entre el 5 y el 12 de agosto, justo tras la finalización del Congreso Universal. Está organizado por la Asociación Internacional de Jóvenes Esperantistas ([TEJO](#)). En el mismo lugar y fechas tendrá lugar el [56º Congreso](#) de la Liga Internacional de Profesores Esperantistas (ILEI).

Además de otros congresos y encuentros, en julio se han programado numerosos cursos intensivos de perfeccionamiento, y también están previstos exámenes oficiales, por ejemplo los organizados [durante el Congreso de Turín](#). Sobre todos ellos, encuentros, congresos, cursos y otras posibilidades, puedes informarte en el calendario de la web [EventaServo](#).



PUBLICADO EL PRIMER PROGRAMA DEL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO 2023

Si no tienes tiempo en verano o si quieres planificarlo con más tiempo, recuerda que en otoño se celebrará en Sevilla el Congreso Español de Esperanto, entre el 12 y el 15 de octubre.

Se ha publicado ya el primer borrador del [programa](#), en el que podemos confirmar la presencia de Duncan Charters, presidente de la [Asociación Universal de Esperanto](#) (UEA), que dará una conferencia sobre el tema del congreso, "comprensión entre los pueblos". También se está trabajando en un precongreso universitario al que todos los inscritos están invitados, el 10 y 11 de octubre, que se celebrará en las Facultades de Filología y Psicología, y contará con la

participación de un nutrido panel internacional de ponentes.

Ya se han inscrito en el congreso [más de 100 personas](#), de más de una docena de países.

Las informaciones básicas y el boletín de inscripción pueden encontrarse en [esta web](#).



ECO DE LA TRADUCCIÓN DE DELIBES AL ESPERANTO

Como indicábamos en el anterior número, se ha publicado la traducción al esperanto de una de las principales obras del escritor castellano Miguel Delibes, *Señora de rojo sobre fondo gris*, con el título *Sinjorino en ruĝo sur griza fono*, a cargo del traductor Antonio Valén.

La [Fundación Esperanto](#), que ha colaborado en la edición, ha organizado una campaña de difusión entre el público. Como consecuencia, diversos medios de comunicación castellano-leoneses se han hecho eco de la traducción, entre los cuales las agencias [EFE](#) y [Europapress](#) y varios periódicos y emisoras de radio.

El director de la Fundación Esperanto visitó la sede de la Fundación Miguel Delibes en Valladolid, e [hizo entrega](#) de un ejemplar a su director (ver la foto adjunta). También se han donado sendos ejemplares a la Biblioteca Nacional y la Biblioteca de Castilla y León, de forma que el libro esté a la disposición de investigadores e interesados.

El libro puede adquirirse en el [servicio de libros](#) de la Federación Española de Esperanto y también en numerosos comercios en línea.




CAMPAÑA PARA EL MANTENIMIENTO DE LOS CURSOS DE DUOLINGO

La gran compañía de aprendizaje de idiomas en red, Duolingo, ha anunciado la desaparición de los [cursos de esperanto](#) por medio de otras lenguas que no sean el inglés. Ello incluye el curso desde el español. La asociación juvenil esperantista mundial [TEJO](#) (*Tutmonda Esperanta Junulara Organizo*) ha lanzado una campaña para intentar evitarlo.

La Federación Española de Esperanto y la Fundación Esperanto se encuentran entre los firmantes de la petición para conservar esos cursos.

A la vez se ha lanzado una campaña en red para que cualquier individuo se pueda adherir a la petición. La puedes encontrar en: <https://www.change.org/p/for-the-duolingo-esperanto-courses-por-la-esperanto-kursoj>.

¡Colabora!




ESPERANTO EN CONGRESO DE TECNOLOGÍAS LIBRES

El esperanto fue objeto de una charla y taller en el seno de un encuentro de personas interesadas en tecnologías libres y cultura abierta [esLibre](#). El encuentro tuvo lugar los días 12 y 13 de mayo en Zaragoza, concretamente en Etopia, Centro de Arte y Tecnología.

El título fue "Concordancias entre el Software Libre y el esperanto" y consistió en una charla introductoria sobre el tema del Esperanto y el Software Libre y un taller de introducción al idioma, a cargo de nuestro compañero Notxor, miembro del grupo [Frateco](#). El salón se llenó y la charla tuvo mucho éxito.

En [este enlace](#) puede verse la presentación y en este un [artículo previo](#) de nuestro compañero sobre el tema (en esperanto).



EL ARCHIVO PERSONAL DE VICENTE INGLADA EN LA BIBLIOTECA NACIONAL


La Biblioteca Nacional de España ha aceptado una donación del archivo personal de Vicente Inglada.

[Vicente Inglada Ors](#) (1879-1949) fue un profesional muy destacado en el campo de la geodesia y sismología, y muy activo [esperantista](#). Organizó actividades, dio cursos, escribió manuales y también [tradujo](#) más de una veintena de obras de la literatura española, colaborando en la difusión de la cultura española.

Durante su vida amasó una importante biblioteca sobre su profesión y sobre el esperanto. El destino de la colección era desconocido, pero recientemente apareció en las manos de un coleccionista particular. Tras diversos intentos de adquisición, el archivo, en el que se incluye también una importante correspondencia y otros documentos sobre las actividades del movimiento esperantista de su época, fue donado a la Biblioteca Nacional, que lo aceptó y ha comenzado a catalogarlo.

Animamos a los curiosos y estudiosos de la historia del movimiento esperantista a que se

interesen en esta nueva adquisición de la Biblioteca Nacional.



EXITOSA PRESENTACIÓN EN YOUTUBE

El pasado mayo, el canal de YouTube *@Linguriosa*, dedicado a las lenguas, dedicó un vídeo al esperanto, con el título "La lengua PROHIBIDA por HITLER: el ESPERANTO". Lo puedes ver en la dirección: <https://www.youtube.com/watch?v=81kgO17qCCo>.

El vídeo, muy bien hecho, ha recibido ya más de 175.000 vistas, 12.000 "me gusta" y 1100 comentarios, en su gran mayoría positivos, con una gran cantidad de espectadores que comentan que están estudiando o han estudiado esperanto. Se trata a menudo de personas muy jóvenes que, según se puede deducir, no suelen participar en la comunidad esperantista, pero muestran un gran interés por el idioma.

El vídeo está hecho con la colaboración de otro canal, *@curiosamente*, también muy seguido, que simultáneamente publicó otro vídeo colaborativo, más general sobre las lenguas construidas, que puedes ver aquí: <https://www.youtube.com/watch?v=1-zlN5GWckM> (el esperanto se menciona alrededor del minuto 5), que también ha recibido hasta ahora unas 90.000 vistas.

Una forma muy destacada de acceder (no solo) a una generación joven e interesada.



¡CELEBRA LA FIESTA DEL ESPERANTO!

El 26 de julio se celebra todos los años el aniversario de la publicación en Varsovia, en 1887, del primer libro en el que se presentaba una nueva lengua internacional, que pronto sería conocida como Esperanto. Por esta razón, desde hace unos años se celebra este día como Día del Esperanto, junto al más conocido Día de Zamenhof, el 15 de diciembre.

Este año la Asociación Universal de Esperanto ha lanzado un llamamiento a celebrarlo de forma especial, como una especie de Fiesta *Nacional*. Puedes leer el comunicado en [este enlace](#).

También desde la Federación Española de Esperanto hacemos un llamamiento a disfrutar del día, aunque en este cálido país la fecha no sea la más conveniente. Y aprovechamos para desear a todos nuestros amigos que tengan un feliz y *esperanzado* verano. ¡Hasta la vuelta!



ALTA SEZONO DE KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ DE ESPERANTO


Jam komenciĝis la alta sezono de esperantaj someraj kongresoj kaj renkontiĝoj.

La Universala Kongreso de Esperanto okazos ĉijare en Torino (Italio), inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto. Oni atendas ampleksan ĉeestantaron, post la problemoj okazigitaj de la monda pandemio. Oni povas trovi ĉiujn informojn, inklude de la manieroj aliĝi, en la retejo de la [LKK](#) kaj tiu de [UEA](#).

La 79-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Lignano Sabbiadoro, apudmara loko ankaŭ en Italio, inter la 5a kaj la 12a de aŭgusto, tuj post la fino de la UK. Ĝin organizas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Vidu detalojn ĉe: <https://ijk2023.tejo.org/>. Samtempe kaj samloke okazos [la 56-a Kongreso](#) de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Multaj aliaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas anoncataj por la somero, inklude de la SAT-kongreso en Greziljono, la Baltiaj Esperanto-Tagoj, la pola aŭ la usona kongresoj, interalie. Krome, oni povas mencii la plurajn intensajn kursojn programatajn por julio, kiuj povas taŭgi kiel preparado por la KER-Ekzamenoj [anoncitaj](#) por la semajno de la Universala Kongreso en Torino.

Vi povas ekscii pri ili kaj pri multaj aliaj eventoj, kursoj kaj renkontoj pere de la retejo [EventaServo.org](#).



PRETAS JAM LA UNUA PROGRAMO DE LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO 2023

Se vi ne havas tempon en somero aŭ se vi deziras plani kun pli da tempo, memoru ke en aŭtuno ni celebros en Sevilo la Hispanan Kongreson de Esperanto, inter la 12a kaj 15a de oktobro.

La organizantoj jam publikigis la unuan malneton de la [programo](#), dum kiu ni povas konfirmi la ĉeeston de Duncan Charters, prezidanto de la [Universala Esperanto-Asocio](#) (UEA), kiu prelegos pri la temo de la kongreso, "komprenemo inter popoloj". Oni nun laboras ankaŭ super la organizado de universitata antaŭkongreso, al kiu ĉiuj kongresanoj estas invitataj, la 10an kaj 11an de oktobro, en la Fakultatoj de Filologio kaj Psikologio, kiu ĝuos la partoprenon de ampleksa aro da internaciaj prelegantoj.

Jam aliĝis al la kongreso [pli ol 100 personoj](#), el pli ol dekduo da landoj.

La bazaj informoj kaj la aliĝilo troviĝas en [tiu ĉi retejo](#).



EĤO DE LA TRADUKO DE DELIBES AL ESPERANTO

Kiel ni sciigis en pasinta Bitbulteno, estis publikigita la traduko al Esperanto de *Sinjinoro en ruĝo sur griza fono*, unu el la ĉefaj romanoj de [Miguel Delibes](#) (1920-2010), eble la plej populara verkisto en Kastilio en la mezo de la 20a jarcento.

La [Fondaĵo Esperanto](#), kiu kunlaboris en la eldonado, organizis kampanjon por diskonigo inter la ekstera publiko. Kiel konsekvenco, diversaj amaskomunikiloj de la kastilia regiono eĥis la informon, inter kiuj la ĉefaj informagentejoj [EFE](#) kaj [Europapress](#) kaj kelkaj ĵurnaloj kaj radiostacioj.

La direktoro de la Fondaĵo Esperanto vizitis la Fondaĵon Miguel Delibes de Valladolido, kreitan de la filoj de la romanisto por konservi lian intelektan heredaĵon, kaj [donacis](#) ekzempleron al ties direktoro (vidu foton de li kun la libro en la hispanlingva parto de tiu ĉi bulteno). Oni donacis ekzemplerojn ankaŭ al la Nacia Biblioteko kaj la Biblioteko de Kastilio kaj Leono, tiel ke

la libro estos je la dispono de esploristoj kaj interesitoj.

La libron oni povas akiri en la [libroservo](#) de Hispana Esperanto-Federacio, [ĉe UEA](#) kaj en aliaj retaj vendejoj.



KAMPANJO POR KONSERVO DE LA KURSOJ DE DUOLINGO

La granda kompanio por reta lernado de lingvoj, Duolingo, anoncis la malaperigon de la [kursoj de Esperanto](#) en aliaj lingvoj krom la angla. Tio tuŝas la hispanan kurson, kaj [TEJO](#) (Tutmonda Esperanta Junulara Organizo) lanĉis kampanjon por tion malhelpi.

Hispana Esperanto-Federacio kaj Fundación Esperanto subskribis la alvokon de TEJO kaj petis la kompanion ke ili konservu la kursojn.

Samtempe, oni ankaŭ lanĉis retan kampanjon, por ke individuoj povu subskribi tiun peton. Vi trovos ĝin ĉe: <https://www.change.org/p/for-the-duolingo-esperanto-courses-por-la-esperanto-kursoj>.

Helpu ankaŭ vi!



ESPERANTO EN KONGRESO DE LIBERAJ TEĤNOLOGIOJ

Pro propono kaj iniciato de samideano, eblis verdigi programon de neesperantista kongreso. En Zaragozo, ene de kongreso pri informadiko libera kaj malferma kulturo [esLibre](#), okazis prelego pri Esperanto. Estis nia samideano Notxor (membro de "[Frateco](#)", la zaragoza grupo) kiu pretigis kaj faris paroladon la 12an majo 2023 en konstruaĵo "Etopia".

La titolo temis pri koincidoj de Esperanto kun libera softvaro kaj poste, li faris atelieron pri Esperanto, montrante la bazajn elementojn. La salono estis plenplena kaj la prelego plaĉis al ĉiuj. Estas malofta okazaĵo kiam en ekstermovada evento aperas partoprenantoj kiuj salutas kaj

parolas en Esperanto.

Jen ligilo [al la prelego](#): kaj jen [antaŭa artikolo en Esperanto](#) de nia samideano pri tiu temo.




LA PERSONA ARKIVO DE VICENTE INGLADA EN LA NACIA BIBLIOTEKO

La Nacia Biblioteko de Hispanio akceptis donace la personan arkivon de Vicente Inglada.

[Vicente Inglada Ors](#) (1879-1949) estis profesoro pri astronomio, geodezio kaj meteologio, geografia inĝeniero, sismologo, poligloto, staba oficiro, verkisto, studemulo pri tertremoj kaj aliaj fenomenoj de la naturo, akademiano de pluraj sciencaj institucioj, poeto kaj... [esperantisto](#). Do, elstara personeco, influa en ĉiuj kampoj en kiuj li laboris, inkluzive de la hispana Esperanto-movado. En tiu ĉi tereno, li laboris kaj en organizaj taskoj de la movado kaj en la disvastigo kaj instruado de la lingvo. Li ankaŭ [esperantigis](#) pli ol dudek verkojn de hispana literaturo, ĉefe teatraĵojn, tiel kontribuante al la disvastigo de la hispana kulturo internacie.

Li kunmetis laŭlonge de sia vivo grandan bibliotekon pri siaj du grandaj pasioj, geofiziko kaj Esperanto. La sorto de tiu biblioteko-arkivo post lia morto restas nekonata, sed ĝi nun aperis en la manoj de kolektisto. Post diversaj provoj akiri ĝin, la arkivo estis donacita al la Nacia Biblioteko, kiu akceptis ĝin kaj komencis ĝin katalogi.

Ni kuraĝigas scivolemulojn kaj esploristojn pri la historio de la Esperanto-movado interesiĝi pri tiu ĉi akiritaĵo de la Nacia Biblioteko.



SUKCESA PREZENTADO EN JUTUBO

En majo la tre sekvata kanalo pri lingvoj en Jutubo (Youtube) *@Linguriosa*, dediĉis unu videon al Esperanto, kun la titolo "La lengua PROHIBIDA por HITLER: el ESPERANTO". Vi povas ĝin spekti ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=81kgO17qCCo>.

La video jam havis 175.000 spektadojn, 12.000 ŝatosignojn kaj 1100 komentojn, plej ofte pozitivaj, kun multege da homoj kiuj komentas ke ili studas/is Esperanton, tre ofte junaj homoj kiuj verŝajne ne estas enkalkulitaj en la movado, plus multaj kiuj montras aŭtentikan scivolon.

La video estas kunlaboro kun alia kanalo, *@curiosamente*, tre sekvata, kiu samtempe elsendis duan filmon, pli ĝeneralan pri konstruitaj lingvoj <https://www.youtube.com/watch?v=1-zlN5GWckM> (Esperanto estas menciata ĉirkaŭ la minuto 5), kiu ĝis nun ricevis ĉ. 90.000 spektadojn.

Jen tre grava maniero aliri novulojn kaj (ne nur) junajn homojn.



La lengua PROHIBIDA por HITLER: el ESPERANTO | *@curiosamente*
 Linguriosa 479 K suscriptores 12 K Compartir Gracias

LA NACIA FESTO DE ESPERANTISTOJ: LA 26A DE JULIO ĈIUJARE

La 26-a de Julio estos la datreveno de la apero en Varsovio de la Unua Libro, la prezentado de la lingvo Esperanto. Do, de antaŭ jaroj oni ofte festas ĝin kiel la Tago de Esperanto, apud la plej konata Zamenhof-Tago, la 15-a de Decembro. Nun, laborgrupo en la sino de UEA lanĉis vastan alvokon por festi la tagon kvazaŭ temas pri *nacia* festo, kaj ili faras alvokon al la grupoj kaj asocioj "meti la movadon pli en la publikan vivon de la landoj". Legu la tutan alvokon ĉe: <https://sezonoj.ru/2023/06/festo-4/>.

Ankaŭ el Hispana Esperanto-Federacio ni faras la alvokon ĝui kaj festi la Tagon, eĉ se la dato ne estas la plej konvena en nia varma lando. Kaj ni profitas la okazon por deziri al niaj amikoj en la norda hemisfero tre feliĉan kaj *esperantan* someron!

